31 JUL 1953

Julio-Aŭgusto 1953. Nro 11-12.

# LA JUNA VIVO

T.E.J.O.
MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO"

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando
Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando
Ĝiro Nro 537168. Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

## GRAVA ADMONO.

Ne estas kutimo, ke la redaktorino skribas la ĉefartikolon, nun mi tamen faras tion pro la speciala karaktero de la afero. Mi nur lastmomente ricevis la liston de la aliĝintoj, el kiu evidentiĝas, ke el la estraro bedaŭrinde neniu partoprenos la kongreson. La tempo antaŭ la kongreso estas tre mallonga por interkontakti. Ankaŭ en la presejo de LJV oni libertempos de la 15a ĝis la 29a de julio. Sed LJV devos nepre esti antaŭ la kongreso en la posedo de ĉiuj anoj. En la lasta numero de LJV kaj ankaŭ en la nuna vi vidos multajn gravajn proponojn por la IJK. Samtempe vi povos vidi en la listo de la aliĝintoj, ke nur malmultaj aktivaj membroj ĉeestos la kongreson. Kvankam mi estas nur subtenanta membro, estas nun mia tasko peti tiujn geamikojn, kiuj ne vizitos la kongreson, ke ili nepre skribu antaŭ la 1a de aŭgusto al la adreso de la L.O.K. en Wörgl sian opinion pri la pridiskutendaj temoj. La proponotaj ŝanĝoj estas sufiĉe gravaj por ne neglekti ilin.

Estas superflue diskuti pri tio, kial ne anoncis sin pli da anoj. La programo estas alloga, la ĉirkaŭaĵo de la kongresloko belega. Povas esti, ke la urbeto ne situas favore rilate al la aliaj kongresurboj (Zagreb kaj Sheffield), povas esti, ke aliaj, pli gravaj kaŭzoj retenis multajn el ni. Ja preskaŭ en la sama tempo okazos diversaj aliaj aranĝoj i.a. la feria semajno en Konstanz, la studenta kunveno en Ljubljana, arĥeologa tendaro en Danlando, ktp.

Kiam mi pasintjare transprenis la redaktadon, mi esperis, ke antaŭ la fino de la redakta jaro anoncos sin kelkaj gejunuloj por gvidi la aferojn. Mi eraris. Sed espereble almenaŭ koncerne la kongresproponojn montros miaj junaj geamikoj intereson kaj referendumos pri ili. Pripensu, ke antaŭ la komenciĝo de la kongreso devos esti la letero en la posedo de la L.O.K.

E. Burgler-Jezsó.

# PARENTEZE.

## Ŝerco.

*Ie en Kaniballando, julio 1953-a.*

*Karaj Gelegantoj de L.J.V.!*

*Vi eble ankoraŭ memoras ke mi en la marta numero de nia gazeto skribis, ke mi pere de nia Vojaĝservo planis gigantan mondvojaĝon.*

*Kaj jen mi troviĝas meze en — Kaniballando, lando, kiun (se la V.S. min bone informis) nur du aŭ tri blankuloj vizitis antaŭ mi!! Mi tiom multe travivis, ke mi preskaŭ ne scias kion unue skribi.*

*Kiam mi alvenis ĉi-tie, post 24-taga kanotremado, mi subite estis ĉirkaŭata de granda grupo da indiĝenoj, kiuj kaptis min, tiklis min per lancoj kaj poste metis min en grandan nigran poton sub kiu baldaŭ ekbrulos fajro ......*

*Kvankam la kanibalestro diris, ke li havas bonan apetiton, li estis preta ne kuiri min, kondiĉe ke mi montru ion al li, kion li neniam antaŭe vidis. Mortpale mi prenis mian Esperantoinsignon, sed li larĝe ridis, dum kio mi vidis lian tutan dentaron, ĉar li jam dum 45 jaroj estas Esperantisto! (Pasintjare li aliĝis al la veteranoj ...). Febre mi traserĉis miajn poŝojn, kaj iu nigrulo jam alportis fajron por bruligi la lignon sub mia poto, kiam mi hazarde trovis mian benzin-fajrigilon. Tuj mi faris fajron kaj ne sen fiero montris al la estro la aparaton, dume forviŝante la ŝviton de mia frunto. Grandioza estis la sukceso! La indiĝenaro senĉese kriis abiabi abiabi kaj la estro min gratulis ĉar mi ja savis mian vivon. Li, kaj liaj „civitanoj”, vi sciu, ankoraŭ neniam vidis tian aparaton, — kiu tuj funkcias!!!*

*Kaj ilia intenco manĝi min, ho ne miru, nur estis tipa, tre tipa, ŝerco de la estro ......*

*kore, via*



# SEKRETARIA JARRAPORTO DE TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO SEPT. 1952 — SEPT. 1953.

*Kongreso:* La internacia junularkongreso okazis en la dana urbeto Ry, kie ĉeestis 108 personoj el 11 landoj. Dum la ĝenerala membrokunsido oni re-elektis Tammo Kanter (prez.), Geert de Vries (kasisto), Kurt Meyer kaj Michel Duc Goninaz (asesoroj). Krome aldoniĝis Helmi Veldhuyzen, kiu ne estis re-elektebla en la sekretaria funkcio, kiel asesorino. Al la prezidanto oni komisiis elekti mem novan sekretarion. Oni akceptis la projekton de la nova regularo, same kiel tiun de kongresregularo. Pro la fakto, ke la nomo de nia organizo en naciajn lingvojn tradukita, ne estas tre klara, oni decidis ŝanĝi ĝin en Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo.

*Estraro:* Kvankam ne estis facile trovi taŭgan sekretarion, la prezidanto trovis Felix Kat preta funkcii kiel helpsekretario, dum ke li mem fariĝis sekretario. Dum la lastaj monatoj Felix Kat prizorgis preskaŭ la tutan sekretarian taskon. — Ĉiuj asesoroj akordiĝis kun la de la taga estraro proponita taskodivido: Helmi Veldhuyzen-Informa Fako, Michel Duc-Dokumentado kaj Gazetarservo kaj Kurt Meyer-Vojaĝservo. Je nia bedaŭro Helmi devis eksiĝi el la estraro jam en decembro; ĝis nun ni ne sukcesis anstataŭi ŝin. La taga estraro laŭpove okupis sin pri la fako, sed je sia bedaŭro ne povis efektivigi ĉiujn planojn en Ry pri parolitajn.

Al la laboroj de la prezidanto kaj sekretario apartenis i.a. la organi-

zado de la venonta kongreso en 1953. Kvankam oni en Ry decidis okazigi ĝin en la aŭstra urbo Kufstein, la estraro decidis interkonsente kun L.O.K. elekti Wörgl, kiel la plej taŭgan kaj konvenan lokon. — Renovigita estas la kontakto kun gejunuloj en la nepagipovaj landoj. Diversaj (sed nemultaj) membroj anoncis sin por povi regule sendi sian legitan LJV-on al tiuj personoj. La estraro konigas sian nekontentecon pri la tre nehelpema sinteno de la membroj: ĝi atendis pli da kompreno! Alia grava afero, pri kiu la prez. kaj sekr. sin okupis estas la kontakto kun aliaj junularaj movadoj. Ĝi tamen limigis sin je Nederlando, kies peranto ĝi estas. Krom kun kelkaj lokaj junularaj grupiĝoj esperantistaj la nederlanda sekcio de TEJO nun kunlaboras kun SAT-Junulfako (ned. frakcio) kaj la junulara movado de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E. en Nederlando: Ju-Ko. Dum la komuna pentekosta kunveno, en kiu krome okazis la landa jarkunveno de la ned. sekcio, elektiĝis taga estraro kaj diversaj komisionoj, i.a. propagandokomisiono: oni nome decidis ke la propagando por Esperanto inter la junularo komune t.v.d. ŝub aŭspicioj de la Kunlaborkomitato, estos farata.

La kasisto, kiu transprenis ankaŭ la administradon, dum la tuta jaro febre laboradis por reorganizi la sistemon. Montriĝas tamen, ke pri la kunlaboro de la perantoj rilate al ĉi tiu afero ne povas esti fanfaronata. Kune kun Koos Jonker li ĉiumonate dissendis LJV-on.

Pri la laboro de la asesoroj vi trovos en alia numero apartajn raportojn.

*Perantoj:* La jenaj perantoj eksiĝis: Michel Schmidt (Germanujo) kaj Ben Sion Ohana (Maroko). Novaj perantoj estas: Rolf Brune (Germanujo), Maximilian Frense (Kanado) kaj Koos Kranenburg (Nederlando).

Diversaj perantoj elektis helpantojn en aliaj lokoj, kiuj tie reprezentas difinitan regionon kaj zorgas pri la enspezado de la kotizoj, propagandas ktp. Ni konsilas al niaj perantoj fari la samon, ĉar tiamaniere ankaŭ la kontakto inter la unuopaj membroj multe povas esti fortigata.

La estraro devas konstati, ke la perantoj tro malofte raportas pri siaj faroj kaj ke multaj perantoj kredas, ke per la nura enspezado de la kotizoj ilia laboro estas finita. Ili bone komprenu ke ili reprezentas tutan landon kaj ke ili do ankaŭ estas respondecaj pri la evoluo de nia organizo en ilia lando: landoj kun multaj membroj klopodu aranĝi landan kunvenon por ke estiĝu pli bona kontakto inter ĝiaj membroj. Oni klopodu aranĝi landan kunvenon kaj kontakti kun aliaj junularaj organizoj esperantistaj, kun kiuj oni havu komunajn kunvenojn ktp: la perantoj donu tiun okazon al siaj membroj! Oni komprenu, ke la TEJO-membroj ne estas iuj apartaj Esperantistoj kaj ke ili nepre ne nur ĉiam serĉu en la propra rondo! — Pri la laboro de kelkaj perantoj ni estas tre kontentaj. En la franca sekcio Daniel Luez kun fervoro laboradas kaj ni dankas lin pro liaj regulaj raportoj. Ankaŭ la itala sekcio faris kelkajn novajn kontaktojn, dum ke en Anglujo f-ino Rees bonege estas helpata de la helpperanto O'Sullivan. Max. Frense en Kanado aktive eklaboris kaj kontaktis kun Donald Broadribb, la prez. de la junulara sekcio de EANA. Ili venis al la interkonsento, ke membroj de EANA-Junularsekcio samtempe estu membroj de TEJO kaj inverse. Bonega ekzemplo de kunlaboro kun landa asocio!

*Membroj:* Stato de la membro nombro je 25-6-53 (inkluzive familiajn membrojn).

| | '52 | '53 |
|---|---|---|
| Alĝerio | 1 | 2 |
| Aŭstralio | 3 | 5 |
| Aŭstrujo | 13 | 11 |
| Belgujo | 9 | 14 |
| Brazilo | 6 | 8 |
| Britujo | 123 | 154 |
| (Bulgarujo) | 4 | 1 |
| (Ĉehoslovakujo) | 13 | 11 |
| Ĉinujo | 1 | 1 |
| Danujo | 15 | 20 |
| Egiptujo | 1 | 1 |
| Finnlando | 5 | 8 |
| Francujo | 49 | 95 |
| Germanujo | 76 | 84 |
| (Germanujo-Orienta parto) | 6 | 6 |
| Hispanujo | 22 | 15 |
| (Hungarujo) | 3 | 0 |

| | '52 | '53 |
|---|---|---|
| Irlando | 1 | 1 |
| Italujo | 19 | 1 |
| Jugoslavujo | 30 | 11 |
| Kanado | 3 | 3 |
| Maroko | 3 | 5 |
| Nederlando | 292 | 238 |
| Novzelando | 3 | 2 |
| Norvegujo | 3 | 4 |
| (Polujo) | 3 | 3 |
| Svedujo | 14 | 17 |
| Svisujo | 5 | 6 |
| Tunisio | 1 | 1 |
| Uruquay | | 3 |
| Usono | 4 | 6 |

Kvankam ni intencis al vi doni detalan liston de la membronombro laŭ la diversaj aĝokategorioj, ni bedaŭrinde ni povas efektivigi tion pro la fakto ke multaj membroj ne ensendis la demandarojn, kiujn ni enmetis en la dec/jan nro de LJV. Pro tio al ni ne estas eble doni al vi la precizan nombron de aktivaj, aspirantaj membroj kaj subtenantoj.

La nombro de aspirantaj membroj malpliiĝis pro la fakto ke la tuta LJV por ili estas tro multekosta kaj ke ili nur trovis tre malgrandan parton (La Burĝono) por ili taŭga.

En majo aliĝis al TEJO kolektive la junulara sekcio de Svisa Esperanto-Societo (nombro de membroj 25).

Ĉar ni enkalkulis la familiajn membrojn, ŝanĝiĝis la nombro en kelkaj landoj.

*La Juna Vivo - La Burĝono:* Nova redaktorino fariĝis s-ino E. Burgler, kiu anstataŭis f-inon Kool, kiu lasta dum multaj jaroj (ek de 1934) prizorgis LJV-on kaj al kiu TEJO ŝuldas multan dankon. Kune kun la ŝanĝiĝo de la redakcio ankaŭ grave ŝanĝiĝis la gazeto, kiu komence de la oktobra numero aperis kun amplekso de 12 paĝoj kaj verda kapo. Efektivigo de la origina plano eldoni LJV-on laŭ t.n. ofset-preso ne eblis pro la jam peze ŝarĝita buĝeto. La taga estraro en kunlaboro kun la redaktorino kaj s-ro Muusses, la presisto, en ĉi tiu jaro faris ĉion por kiel eble plej beligi kaj fari alloga la gazeton kaj laŭ la multaj laŭdaj leteroj, ni povas konkludi ke ili sukcesis en tio. En LJV ĉijare trovis lokon ankaŭ. La Burĝono, gazeto por la aspirantaj membroj, kiu antaŭe ciklostilita aperis. Kvankam ni ankaŭ al ĉi tiu parto dediĉis nian plenan atenton, ni devas konstati ke la ĝenerala opinio ne estas tiom favora pri la enhavo, kiu unue estis vere tro malfacila por komencantaj Esperantistoj, tamen en la lastaj numeroj plisimpliĝis kaj pro la malgranda spaco, kiun oni lasas al nia juna kategorio. De pluraj flankoj ni aŭdis, ke malgraŭ la fakto, ke la aspirantaj membroj ricevas la tutan LJV-on, ili nur parte ĝuas ĝin: en la ciklostilita eldono ili trovis multe pli da legaĵoj por ili taŭgajn; la artikoloj en LJV plej ofte estas ne nur tro malfacilaj, sed ankaŭ ne interes plenaj por ili. Ŝajnas do al ni, ke en la venonta jaro ni devas veni al alia aranĝo.

Fine ni dankas la diversajn kunlaborantojn pro iliaj artikoloj kaj Klaas Slauerhoff, la desegninton de la diversaj kliŝoj, pro lia akurata laboro.

*Kontakto kun aliaj asocioj:* Pro la multokupiteco de la taga estraro ĝi ne povis regule kontakti kun U.E.A. kaj kelkaj landaj asocioj.

Leeuwarden, 20-6-1953. Tammo Kanter, prez./sekr.

# RAPORTO POR LA JARO 1952-53.

1. La D. G. kolektis artikolojn pri T.E.J.O. ĉerpitajn el la esp. gazetaro pri TEJO ĝenerale, aŭ pri LJV: „Boletin", „Nederlanda Esperantisto", pri naciaj sekcioj de TEJO: „Franca Esperantisto", pri la kongresoj en Haarlem: „Esperanto" (1951)
   en Ry: Svenska Esperanto Tidningen, La Praktiko, La Suda Stelo, The British Esperantist, American Esperanto Magazine, Belga Esperantisto, Norvega Esperantisto,
   en Wörgl: La Ponto,
   pri Ry kaj Wörgl: la nacia ga-

zeto „Nord Eclair" (Francujo). La menciataj gazetoj estas, escepte de speciala mencio, de la jaroj '52/3.

2. Mi ricevis kaj konservis informojn de la naciaj sekcioj de TEJO aŭ de la naciaj junular-movadoj-esperantistaj ĉu pere de naciaj bultenoj, ĉu de specialaj cirkuleroj, ĉu de korespondado, el jenaj landoj: Britujo, Ĉehoslovakujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Kanado-Usono, Nederlando. Protokoloj pri estrarkunsidoj kaj ĉiuj oficialaj dokumentoj de la TEJO-estraro aŭ de la fakaj servoj estas aparte klasifikataj.
3. Mi eldonas ĉiu tri monate Gazetaran Bultenon, kiu estas sendata kvarekzemplere al ĉiu ĉefperanto de TEJO. La dua nro aperos antaŭ la fino de junio. Mi ricevis petojn pri informoj pri TEJO kaj sendis la deziratajn informojn al: „Ligue de l'Enseignement" kaj „Groupe des Espérantistes de l'Enseignement".
4. Nenio estas menciinda pri tiu punkto pro la nefunkcio de la P.F.
5. Raporto pri la IJK en Wörgl en ĉiuj esperantaj gazetoj estos prizorgata de la D. G.
6. vidu 4.

Mich. Duc Goninaz.

## PREPARAĴOJ.

Profesoro David eniris la ĉambregon ekzamenan de la anatomia fakultato. En la mano li singarde portis glason enhavantan preparaĵon, kiun li antaŭ kelkaj minutoj elektis el la universitata muzeo. Videbla li starigis ĝin sur sian pupitron, elpoŝigis la notlibreton kaj komencis la ekzamenon.

„Kandidato Bogumil, kion signifas tiu preparaĵo?" Bogumil tusis malespere, poste li balbutis: „Hepato de drinkulo, s-ro profesoro!"

Malkontente la profesoro kapneis. „Malĝuste! Sidigu vin!" Li notis ion en sian notlibreton kaj alvokis la sekvanton.

„Kandidato Orlando, kion prezentas tiu preparaĵo?" La aspiranto Orlando levis sin tremante kaj diris: „Estas la korsaketo de kaprino."

„Malsufiĉe! Sidigu vin!"

La sekvanto respondis: „Tio estas la ruinigita lieno de seninterrompa ĉenfumanto." Tamen, ankaŭ li ricevis la juĝon „malsufiĉe" — kune kun li ĉiuj de la tridek-tri kandidatoj, kiuj alterne opiniis, ke ĝi estas la stomako de idioto, aŭ la pulmo de bovino, aŭ la eta cerbo de grandkomercisto. Neniu sciis ĝin ĝuste.

La profesoro fariĝis pli kaj pli kolera ......... „Trinki bieron — sidi en gastejaĉoj, tion la sinjoroj scipovas", li kolerege ekkriis de la alta katedro — „sed studi kaj lerni ion, por tio mankas al vi ĉiuj la necesa seriozo. Ĉu vi scias, sinjoroj, kion prezentas la preparaĵo en ĉi tiu glaso? Estas la malŝvelinta reno de viro en la meza aĝo!"

La pedelo, enirante la aŭlon, proksimiĝis malbrue.

„Pardonu ......, profesora moŝto ........."

„Nu? Kio okazis?"

La pedelo klinis la kapon al la orelo de la profesoro kaj flustris: „Mi nur volas informi vin, ke la malŝvelinta reno ne plu estas en la glaso, jam ekde la pasinta semestro. La renon mi enmetis en alian ujon. En ĉi tiun glason mi metas ek tiu tempo mian **fenestran spongon** .........!"

Hotero.

**En Podlabin, Jugoslavujo,** Esperanto estas devige instruata al 114 infanoj 10-14-jaraj, inter kiuj estas 30-membra orkestro de „tamburice" (nacia instrumento). Loka karbminata entrepreno subtenas tiujn gejunulojn kaj promesis ebligi al ĉiu la aliĝon kaj partoprenon al la kongreso.

L.K.K. tial urĝe petas, ke granda nombro de gejunuloj venu al Zagreb. L.K.K. preparos specialan programon por la junularo.




# 9ª kongreso en Wörgl

## JEN LA LASTAJ SCIIGOJ POR LA KONGRESO:

1. Al la festvespero kontribuos:
   a. 4 ges-anoj el Aschaffenburg (Germanujo) per kantoj kaj aliaj aferoj.
   b. s-ano Petersen el Kopenhago (Danujo).
   c. S-ano Neuszner el Berlin-Lübars (Germanujo) prelegos (en serioza kadro) iom pri la „Historio de la mono".
2. La AKCEPTEJO troviĝas en „Gasthof Hauser" (gastejo Haŭser) tuj apud la stacidomo de Wörgl. *(Por plirapidigi la aferojn en la akceptejo estas tre dezirinde, ke ĉiu aliĝinto sciu sian kongresnumeron — laŭ la listo en LJV —)*
3. KONGRESEJO estas la gastejo „ALTE POST" en la urba centro tuj apud la preĝejo.
4. Informojn vi povas ricevi (dum la kongreso) aŭ en la akceptejo aŭ en la kongresejo. — Ŝanĝoj en la programo estos ĉiam ĝustatempe diskonigataj.
5. La kongreskartoj ne estos alsendataj al la aliĝintoj (pro la altaj poŝtafrankoj), sed transdonataj al ĉiu tuj post la alveno kune kun la kongrespaperoj. — La kuranta numero en la nomlisto de LJV estas samtempe la kongresnumero.
6. INTERKONA VESPERO (3.8.52) okazos en unuaklasa salonego de *Stacidoma Restoracio.*
7. L.O.K. treege petas, ke tiuj kongrespartoprenantoj, kiuj bonvolas kunporti grandajn naciajn flagojn por ornamado de la stacidoma placo, nepre baldaŭ sciigu tion al L.O.K., por ke tiu povu starigi koncernan nombron da flagstangoj jam antaŭ alveno de la kongresanoj.

Por la kongreso anoncis sin entute 60 personoj+ grupo de 17 gejunuloj el Berlino. La nomoj ĝis nun ne estas konataj.

## LISTO DE LA KONGRESANOJ.

| Kongres-numero | Familia nomo | Antaŭnomo | Titolo k. aĝo | Loĝloko | Lando |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | **Cuenè** | Marcel | S-ro | Meknes | Maroko |
| 2 | **Cuenè** | Pierre | knabo 11 | Meknes | „ |
| 3 | **Cuenè** | Bernard | knabo 9 | Meknes | „ |

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 4 | **Pedersen** | Kaj | s-ro | 25 | Kopenhago | Danlando |
| 5 | **Halbedl Dro** | Adolf | s-ro | 60 | Knittelfeld | Aŭstrujo |
| 6 | **Steiner** | Hugo | s-ro | 75 | Wien | " |
| 7 | **Steiner** | Hans | s-ro | 43 | Wörgl | " |
| 8 | **Kainer** | Therese | f-ino | 48 | Wörgl | " |
| 9 | **Erlacher** | Josef | s-ro | | Kirchbichl | " |
| 10 | **Burgler** | Elis. | s-ino | | Geleen | Nederlando |
| 11 | **Roudaut** | Prisca | f-ino | 27 | Hydrequent Rinxent | Francujo |
| 12 | **Neussner** | Alfred | s-ro | 26 | Berlin-Lüb. | Germanujo |
| 13 | **Neussner** | Adelheid | s-ino | 24 | Berlin-Lüb. | |
| 14 | **Giloteaux** | Lucien | s-ro | 25 | Croix | Francujo |
| 15 | **Hopfenmüller** | Anton | s-ro | 26 | Aschaffenburg | Germanujo |
| 16 | **Röder** | Anneliese | f-ino | 18 | Aschaffenburg | " |
| 17 | **Blum** | Willibald | s-ro | 16 | Aschaffenburg | " |
| 18 | **Fischer** | Annemarie | f-ino | 18 | Aschaffenburg | " |
| 19 | **Ashton** | Michael | knabo | 13 | Denton | Anglujo |
| 20 | **Beresford** | Mary | s-ino | 23 | Denton | " |
| 21 | **Brierley** | Irene | knabino | 14 | Denton | " |
| 22 | **Carrington** | Ivy Joan | f-ino | 18 | Denton | " |
| 23 | **Clayton** | Betty | f-ino | 16 | Denton | " |
| 24 | **Eades** | Elizabeth | s-ino | 42 | Denton | " |
| 25 | **Eades** | Patricia | knabino | 15 | Denton | " |
| 26 | **Grattidge** | Diane | knabino | 15 | Denton | " |
| 27 | **Heaton** | Margaret | f-ino | 19 | Audenshaw | " |
| 28 | **Johnson** | Edith | f-ino | 15 | Denton | " |
| 29 | **Jones** | Pauline | knabino | 14 | Denton | " |
| 30 | **Knowles** | Margaret | knabino | 14 | Denton | " |
| 31 | **Lees** | Elizabeth | knabino | 14 | Denton | " |
| 32 | **Mellor** | Janet | knabino | 14 | Denton | " |
| 33 | **Mills** | Constance | f-ino | 40 | Denton | " |
| 34 | **May** | Frederick | s-ro | 65 | Romford | " |
| 35 | **May** | Elizabeth | s-ino | 58 | Romford | " |
| 36 | **Morgan** | Karel | knabino | 13 | Haughton Dale | " |
| 37 | **Pearson** | Winifred | knabino | 13 | Denton | " |
| 38 | **Platt** | Doreen | f-ino | 23 | Denton | " |
| 39 | **Shawcroft** | Barbara | knabino | 14 | Denton | " |
| 40 | **Spittle** | Pamela | knabino | 14 | Denton | " |
| 41 | **Sullivan** | James Herb. | s-ro | 40 | Urmston | " |
| 42 | **Sullivan** | Barbara | s-ino | 42 | Urmston | " |
| 43 | **Sullivan** | David Eric | knabo | 12 | Urmston | " |
| 44 | **Sullivan** | Kathleen | knabino | 8 | Urmston | " |
| 45 | **Sutcliffe** | Carole Ann | knabino | 14 | Denton | " |
| 46 | **Tickle** | Mary | f-ino | 36 | Hyde | " |
| 47 | **Walstow** | Phyllis | f-ino | 40 | Audenshaw | " |
| 48 | **Williams** | Gwynneth | knabino | 15 | Denton | " |
| 49 | **Williams** | Norman | s-ro | 45 | Denton | " |
| 50 | **Williams** | Dorothy | s-ino | 45 | Denton | " |
| 51 | **Williams** | Timothy | knabo | 13 | Denton | " |
| 52 | **Williams** | Ian Gabriel | knabo | 10 | Denton | " |
| 53 | **Williams** | Andrew | knabo | 7 | Denton | " |
| 54 | **Wilson** | Henry Alfr. | s-ro | 55 | Dagenham | " |
| 55 | **Siber** | Eugen | s-ro | 22 | Konstanz | Germanujo |
| 56 | **Steinhart** | Ruth | knabino | 14 | Konstanz | " |
| 57 | **Chanut** | Fabiano | s-ro | 28 | Nancy | Francujo |
| 58 | **Chevrier** | Michel | s-ro | 20 | Baccarat | " |
| 59 | **Andersson** | Arne | s-ro | 32 | Halmstad | Svedujo |
| 60 | **Brinkmann** | Gerd.-J. | s-ro | 21 | Herford | Germanujo |

**Propono** de Mich. Duc Goninaz **pri ĝenerala sistemo de aliĝo al TEJO:**

- Oni fiksu kotizon individuan, kiun pagu ĉiu membro 14-30 j. de TEJO (do aktiva membro) kiu ajn estas la aniĝmaniero. Tiu kotizo povus esti ekz. 1 guld. (inkluzive de la parto por la landa sekcio).
- Oni fiksu abonprezon por La Juna Vivo (ekz. 3 guld.) kaj
- ĉiu membro de TEJO izolata, estas devigata aboni la gazeton (do, kiel nun)
- la membroj organizataj en grupo (kiu ajn la nombro) povos aboni kolektive la gazeton (sed ĉiu pagos la individuan kotizon) tiamaniere, ke ĉiu povos legi ĝin (tio do ne validas por landaj organizaĵoj, sed nur por *lokaj grupoj*). Se la grupo havas pli ol dek membrojn, oni povas ekz. devigi ĝin aboni 2 ekz. 3 ekz. se ĝi havas pli ol 20 membrojn ktp.

Tiamaniere:

- ĉiuj anoj de TEJO legos la gazeton kaj oni evitos la eraron de UEA kaj de aliaj organizoj al kiuj oni povas aniĝi neabonante la organon oficialan;
- ne ekzistos „laŭleĝa diferenco inter „individuaj" kaj „kolektivaj" membroj. Ĉiu pagos individuan kotizon kaj estos konsiderata kiel „aktiva membro";
- oni atingos la rezultatojn celitajn de la sistemo de kolektiva aliĝo, t.e. envicigi en TEJO-n jam ekzistantajn junularajn rondojn esperantistajn.

Kompreneble oni ne fiksu minimuman nombron por grupo. Nur 2 aŭ 3 junuloj rajtus kolektive aboni la gazeton, kondiĉe 1e) ke ĉiu pagu la individuan kotizon, 2e) ke ili loĝu en la sama urbo. Se en grupo kelkaj anoj deziras aboni persone la gazeton, tiom pli bone ......

Por la nemembroj (pliaĝuloj, ktp.) oni fiksu abonprezon, kiu egalos la ordinaran abonprezon+ la sumon de la kotizo (do, kiel nun), do 4 guld. La danĝero, ke nunaj anoj malabonus, ne estas granda, ĉar la TEJO-anoj estas plejparte izolataj. Sed oni tiel povos pli facile aliĝi al TEJO jam ekzistantajn grupojn.

La propono verŝajne havas malavantaĝojn. Oni diskutu pri ĝi en Wörgl. La menciataj ciferoj estas nuraj proponoj. Eble la baza kotizo de 1 guld. estas tre alta. Tiam oni povus ĝin fiksi je 0.50 guld. kaj la abonon je 3.50 guld.

**De Michel Duc Goninaz el Parizo:**

I. La ĉefperantoj estu elektataj ĉiujare de la anoj en la koncerna lando ĉu dum nacia kongreso, ĉu pere de referendumo, ĉu pere de baloto de la anoj de la koncerna lando dum la I.J.K. (se la nombro estas sufiĉa).

Klarigo:
la anoj de ĉiu nacia sekcio havu konstantan kontrolon super la laboro de la ĉefperanto; tiu kontrolo estu efektivigata per ĉiujara elekto. Per la nuna sistemo la ĉefperanto povas senfine konservi sian postenon, eĉ se li ne estas aktiva, kaj tio ofte okazas.

II. Realtigi la kotizon, kiun ricevas la naciaj sekcioj, je 20 %.

## ORGANIZAJ INFORMOJ:

**Landaj sekcioj:** El Italujo venis la ĝojiga sciigo, ke grupo da gejunuloj en Aquila (Italujo) aliĝis al TEJO. S-ano Bronzetti Georgio, la prezidanto de la grupiĝo, provizore funkcios kiel sekretario kaj loka peranto.

## GRAVA INTERKONSENTO INTER NORDAMERIKA ESPERANTO-JUNULARO KAJ NIAJ TIEAJ SEKCIOJ.

De nia kanada peranto, Max. Frense, Royal Road 2, Fourth Line, Sault Ste Marie/Ont. ni ricevis kopion de akordo, farita inter li kaj Donald Broadribb, al ni konata pro liaj regulaj ensendoj por LJV, estanta la reprezentanto de EANA (Esperanto-Asocio de Nordameriko) - Junulara Sekcio. Ĉi tiu akordo ŝajnas al ni de la pleja graveco kaj pro tio ni ĉisube entute presigis ĝin, por ke ankaŭ aliaj perantoj ekhavu impreson. La nomita ago havas la plenan simpation de la estraro de TEJO, kiu konsideras ĝin grava paŝo antaŭen por ambaŭ movadoj.

Akordo farita inter:

S-ro M. Frense (reprezentante TEJO-n) kaj S-ro D. Broadribb (reprezentante EANA-n).

Konsiderante la gravecon de unueca kunlaborado en la Esperanto-movado de la junularo kaj la gravecon de internacia kaj nacia kunlaborado, S-ro Frense por la nordamerika TEJO-sekcio kaj S-ro Broadribb por la junularsekcio de EANA faras akordon pri kunlaborado rilate al la junularo esperantista de Nordameriko.

Estas akordite ke estos fondata komuna sekcio, kiu estos ne-oficiala ligo de la EANA kaj TEJO-nordamerikaj junulsekcioj. Principoj de la sekcio estos:

1. Labori por forta junularsekcio esperantista en Nordameriko.
2. Respekti la nacian Esperanto-asocion, Esperanto-Asocion de Nordameriko (EANA), ĝin fortigante kaj subtenante per la principo ke ĉiu membro de la sekcio estos samtempe membro de EANA (junularsekcio).
3. Respekti absolutan neŭtralecon rilate al ĉiu politika, socia aŭ religia temoj.
4. Respekti la leĝojn de la landoj Usono kaj Kanado.
5. Uzi la lingvon Esperanto (tiun lingvon, kiun difinas la **Fundamento de** Esperanto, aprobita en 1905 de la unua U.K. kaj la deklaroj de la oficiala Akademio de Esperanto) kaj laŭbezono la anglan kaj francan lingvojn por kontakti neesperantistojn.
6. Rifuzi subteni skribe aŭ age iun organizon kiu kontraŭagas iu(j)n el la antaŭmenciitaj principoj.

subskriboj: Maximilian Frense 2.5.1953.
Donald R. Broadribb 18.4.1953.

La estraro konstatis ke en pluraj landoj oni volas labori en tiu direkto kaj pro tio opinias utile diskuti pri ĉi tiu temo en Wörgl. Unu el la plej bonaj manieroj de kunlaborado estas la suprenomita, en kiu kazo (kompreneble se la membroj de ambaŭ sekcioj akceptas la konkordon), la membroj devas esti aliĝintaj al ambaŭ unuiĝoj, tiamaniere formante la Nordamerikan Esperanto-Junularon, estante kaj nacie kaj internacie bone fundementata.

T. K.

**Peto de la kasisto: Pro la oftaj malfacilaĵoj je enkasigo de kotizoj ni petas vin pagi la kotizon por '53/'54 antaŭ la 1a de oktobro 1953a al la ĝirkonto de TEJO, aŭ al via landa peranto. Post tiu dato ni enkasigos ĝin per kvitancoj kaj ni estos devigataj plialtigi la sumon per la enkasigkostoj.** Kotizoj: aspirantaj membroj 2.— guld. akt. 3.— subten. 3.— (aŭ egalvaloro).

## KORESPONDADRESOJ

*Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.*

**Anglujo:** Sro J. B. Hanley, 11, Central Drive, Romiley, Ches. dez. kor. kaj interŝanĝi p.m. kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.

**Japanujo:** 1000 geklubanoj dez. kor. kaj interŝ. PM, PK, ktp. Ni nepre respondos. Skribu al: Esp. koresp. klubo, 260. Oka-Shinmachi, Hirakata-City, OSAKA.

**Hispanujo:** Sro Rafael Sorolla, str. Torrente Vidalet 13, 1, BARCELONA (G) dez. interŝ. PM kun ĉiuj landoj.
Sro Pere Segura Català, str. Pavia 57, 1°, BARCELONA (S) dez. kor. kun ĉiuj landoj.

## ETA BIRDO.

Tradukis A. D.

An - taŭ la mo - des - ta do - mo e - ta bir - do sur ti - li', op - ti - mis - me,
5. 4 3. 3 5. 6 4. 4 4. 3 2. 3 4. 5 3 5. 1 3. 3

zorg - li - be - re pri la ma - jo kan - tis ĝi, op - ti - mis - me, zorg - li - be - re
4. 5 6. 6 2 3 4. 3 4 6 5 5 1 3. 3 5. 5 6. 6

pri la ma - jo kan - tis ĝi.
2. 3 4. 5 6 7 1

2. Kaj. plurfoje promenante
Surprizite haltis li
ridetante kaj feliĉa
pro la simpla melodi'.

3. Sed kruele kruda mano
ŝanĝis neston en ruin',
kaj la karan melodion,
oni ne plu aŭdas ĝin.

**Granda sukceso por Esperanto.** Dro Louis C. Vauthier, ĝen. direktoro de la Sanatorio Universitata Intern. decidis je instigo de Sro Henriko Fischer en La Tour de Peilz, Svislando, membro de la Akademio Intern. de Esp. ke en la suprenomita sanatorio en Leysin, Svislando, konstanta Esperanto instruado funkciu kaj ke ĉiuj ĝiaj gastoj kiuj ne povus interkompreniĝi per la kelkaj lingvoj instruotaj, kaj same ankaŭ la saniga kaj cetera oficistaro, estu devigataj lerni kaj uzi Esperanton.

Ni deziras al la Sanatorio Universitata Internacia, ĝiaj gvidantoj, geprofesoroj kaj gastoj multan sukceson.

**Esperanto klubo por infanoj:** Oni nun preparas la starigon de speciala klubo por infanoj en Kopenhago. La inicianto estas sro C. R. Ege (Egilsgade 26, IV. København S.) kiu dum la lastaj jaroj private instruis E-n al infanoj. Nun 30 infanojn li provas kunigi en klubon.

Membroj povas esti ĉiuj gejunuloj 10-16 jaraj (oni tamen ne findecidis pri la aĝolimo). Estas la intenco okazigi monatajn kunvenojn por la junaj membroj kaj interesigi iliajn kamaradojn pri E. Oni intencas ankaŭ trovi eksterlandajn korespondantojn kaj instigi ilin aniĝi al aliaj Esp. kluboj, kiam ili atingas la 16an jaron. Tiele tiu ĉi klubo por infanoj tute ne konkuras kun kluboj junularaj.

(El Dansk Esperanto-blad 1/53).

# la burĝono

MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ

## LA NAJTINGALO KAJ LA MUELILO.

Klik-klak-klik-klak, kantis la granda rado de la muelilo. Ĝi pendis en la rivero kaj la akvo malrapide turnis ĝin. La granda rado estis feliĉa. Ĝi kantis gaje kaj muelis la grenon: tritikon, maizon, sekalon. Ĝi faris el la greno farunon. La muelisto ŝatis la radon. Li estis feliĉa. Multaj homoj aŭdis la gajan kanton de la granda rado kaj ili ĉiuj estis feliĉaj.

Klik-klak-klik-klak ......

Apud la rivero staris saliko. La muelisto laboris dum la tuta tago. Li ne havis tempon ripozi en ĝia ombro.

En la salikarbo, inter la mallarĝaj verdaj folioj, sidis najtingalo. Tirelireli-tirelirala, ĝi kantis. Sed la homoj ne aŭdis la malgrandan najtingalon.

Tirelireli, ploris la malgranda najtingalo kaj ĝi estis malfeliĉa.

Klik-klak-klik-klak, kantis la rado kaj ĝi estis feliĉa.

La najtingalo ne plu volis resti apud la muelilo. Ĝi volis iri al la vilaĝo. Ĝi volis, ke la homoj aŭskultu al la belegaj molodioj, kiujn ĝi kantas. Tirelireli-tirelirala ...

Sed la homoj aŭdis nur la klik-klakadon de la granda rado.

La najtingalo estis kolera. Jes, tio estis malbela de la malgranda najtingalo, sed ĝi estis kolera. Ĝi enviis, ke multaj homoj aŭdas nur la radon.

Estis vespere. La granda rado ripozis. La najtingalo estis tre malfeliĉa kaj flugis al la akvo-muelilo por adiaŭi.

„Adiaŭ, granda rado, mi ne plu revenos." Kaj la najtingalo ploris.

„Kiu vi estas eta birdo?" demandis la rado scivole.

„Mi estas najtingalo kaj mi loĝas en la saliko. Mi volas foriri de ĉi tie, ĉar neniu aŭskultas al miaj belaj melodioj. Ĉiuj homoj venas

nur por aŭdi vin. Kaj ili venas nur kiam vi kantas. Neniu venas por aŭskulti al mi."

Kaj la najtingalo ploris.

„Mi ankoraŭ neniam aŭdis vin kanti, malgranda najtingalo," respondis la granda rado. „Kantu iom por mi, ĉu bone?"

„Mi ne povas kanti. Mi estas laca. Mi kantis dum la tuta tago. Mi ne ŝatas vin granda rado. Kial la homoj aŭdas nur vian malbelan kanton? Kial ili ne aŭdas miajn belegajn melodiojn?"

La rado diris per milda voĉo:

„Vi estas malsaĝa birdeto. La homoj ŝatas aŭdi min, ĉar mi kantas la kanton de la laboro. La homoj ŝatas min, ĉar mi estas utila. Mi faras el greno bonan farunon. La homoj bakas per la faruno panon, aŭ bongustan kukon. La homoj estas kontentaj. La muelisto estas kontenta. Ankaŭ mi estas tre kontenta."

La najtingalo protestis:

„Mi estas tre-tre malkontenta. Mi foriros. Adiaŭ."

„Atendu momenton!" petis la rado. „Mi ankoraŭ neniam aŭdis vian voĉon, kantu ion por mi."

Kaj la najtingalo ekkantis: Tirelireli-tirelirala-tirelireli. Ĝi kantis bele, la melodio estis belega. Sed ĝi estis tre malfeliĉa. Ĝiaj larmoj falis sur la grandan radon kaj de sur la rado en la riveron.

La muelisto sidis en la ĉambro. Li volis ripozi. Subite li aŭdis la belan kanton. Li iris eksteren. Li volis la kanton pli bone aŭdi.

Li eksidis sur la bordo de la rivero kaj diris al la najtingalo:

„Kiom bele vi kantas malgranda birdo! Via kanto faras al mi grandan plezuron. Mi ŝatas vian kanton."

„Ĉu vi aŭdas?" flustris la rado.

La najtingalo kantis eĉ pli bele: tirelirelirala.

La rado diris:

„De post nun kantu nur vespere. Tiam silentas mia kanto de laboro. Tiam ne laboras la homoj. Ili ĉiuj ripozas. Tiam ili havas tempon aŭskulti al vi."

Tirelirelirili, kantis la najtingalo. Ĝi dankis la bonan konsilon kaj restis en la verda saliko. Kaj ĝi estis feliĉa.

## ENIGMO.

Mi estas en patro, ne en la filo, jes en patrino, ne en filino. Mi estas en tablo, ne en la seĝo, min havas infano, sed ne la reĝo. Kio estas mi?

Sendu viajn solvojn ĝis la 1a de septembro. Bonan ferion!